I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

Nº 1 - 2 Januaro kaj Februaro 1962 12-a Jaro

## INVITO DEL CASSIERE

Si è chiuso l'anno solare ed ancora molti dei nostri Soci non hanno versato la quota per il 1962. Non avendo ricevuto avviso di dimissioni dovremo rinnovare e quindi pagare, alle Associazioni di cui siamo aderenti, le quote per i Soci degli anni scorsi, per cui preghiamo vivamente tutti ad inviare la quota urgentemente a mezzo del C.C.P.nº8/24094, oppure due righe di dimissioni. VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE SOCIALI - Sostenete l'Associazione.

Chi riceve il presente "Informa Bulteno" e non intende riceverlo ulteriormente, e non ha interesse al movimento Esperantista, è pregato di farlo presente alla redazione: Via Donato Creti, 61 Bologna. Grazie anticipate!

## 14-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - KONGRESO

### Budapeŝto - Hungarujo inter la 5 - 11 de majo 1962

HUNGARIO INVITAS VIN !

Okaze de nia 14-a kongreso, kun vera gastamo ni invitas ĉiujn kolegojn el ĉiuj landoj. Nia L.K.K. klopodas prepari tiun kongreson je la plena kontento de la partoprenantoj. Pri la preparoj ni mencias jenon: Ni laboras de antaŭ 3 monatoj. La koncernaj instancoj estas favoraj al nia agado kaj tial ni povas diri, ke la 14- estos por ĉiuj kongresanoj bela travivaĵo. En la programo estas antaŭviditaj krom la oficialaj estrar-, labor-, terminara-, k.c. -kunsidoj ankaŭ laŭtradiciaj amuzaj, kulturaj, eĉ tre interesaj aranĝoj, ekz.: ekskursoj al la stalaktitgroto de Aggtelek, kie ni volos havigi neĉiutagan surprizon al la ĉeestontoj, kaj al lago Balaton, la plej granda en Mez-Eŭropo, kies natura beleco kaj lazura akvo estos unika ĝuo por la okuloj de la vizitontoj. Okazos fakaj vizitoj al diversaj fervojaj uzinoj, kie la fakuloj povos konatiĝi kun diversaj iloj, dizel- kaj vaporlokomotivoj, pasaĝervagonoj, k.t.p. Krom la menciitaj programpunktoj la urbego Budapest mem promesas multajn belecojn. Ties belega situo ĉizos neforgeseblajn impresojn en la mensojn de niaj gastoj estontaj.

D-ro BACSKAI, L.K.K.-Prezidanto

Aliloke en ĉi tiu "Informa Bulteno" vi povas legi (itallingve) la informojn kaj la programon pri la venonta I.F.E.F.-Kongreso. Ni ricevis kvanton da aliĝiloj, sed nesufiĉe por ĉiuj niaj membroj. Interesuloj estas petataj sin turni al mi, kaj mi tuj sendos aliĝilon, ĉar la limtago por la malalta kongreskotizo estas jam la 15-an de februaro 1962.

Gimelli p.i. Germano- Via Donato Creti, 61 Bologna

Taŭga horaro por la ira vojaĝo (krom alia menciita aliloke): Forveturo de Bologna la 4-an de majo je la 3,10a horo (de Tarvisio je la10,45a h.) alveno al Vieno Sud. je la 18,10a, forveturo de Vieno West. je la 22,15a alveno en Budapest la 5-a de majo je la 5 a horo.

## NOVAĴOJ PRI LA 29-a INTERNACIA KONGRESO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

La 29-a Kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.) okazos de la 14-a ĝis 21-a de aŭgusto 1962 en Romo. Pri la Kongreso ni havas ĉi tiujn lastajn ciferojn: 171 aliĝoj el 18 nacioj. Post Italujo (55) sekvas Nederlando (27), Germanujo (26), kaj Pollando (22). Ni volas akcenti la fervoron de ĉi tiuj lastaj, vere kortuŝan! Ili certe envias la italajn samideanojn, kiuj povos tiel facile partopreni nian katolikan Kongreson. Aliaj Landoj, laŭ kvanto da anoncintoj, estas: Aŭstrujo, Francujo, Jugoslavio, Hispanujo, Brazilo, Usono, Ĉeĥoslovakio, Belgujo, Britujo, Jordanio, Hungarujo, Svislando, Urugvajo, Madagaskaro.

## LA 15-a I.F.E.F.-KONGRESO EN BRITUJO

Okaze de la 15-a I.F.E.F.-Kongreso en 1963 en Stoke-on-Trent (Britujo) la urbo eldonis faldfolion esperantlingve, se iu deziras ekzempleron bonvolu skribi al la redaktore de "Jen" -Bulteno de Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj. S-ro Horace BARKS, 25 Mars Street, Smallthorne, STOKE-ON-TRENT, Staffs. Britujo.

## INTERNACIA FERIOSEMAJNO EN SVISLANDO

Dum la jare 1962 la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj organizos denove internacian feriosemajnon de la 2-a ĝis la 8-a de septembro, sed ne plu sur la Kormonte. La organizanto kontraktis kun la tre bela kaj tute nova "Volksbildungsheim Oberbalmberg", apud la monto Weissenstein, Kantono Solothurn. Rezervu al vi, jam nun, tiun semajnon!

## VALTELLINA KAJ SPLUGA

Turisma kolora broŝureto kun aparta folio en Esperanto, enhavanta poezion: "La Lingvaĵo de Valtellina". Kolora faldfolio kun detala plano de la montare kaj de la provinco. Havebla senpage. Petu ĝin kaj pliajn informojn, skribante esperantlingve al: "ENTE PROVINCIALE DEL TURISMO", Via Piazzi, 19 SONDRIO (Italujo).

## "N O V A   C I V I T O"

Kiam vi legos ĉi tiun Bultenon, jam aperis la dezirita revue: NOVA CIVITO. Streĉe laboris por ĝi diversaj romaj esperantistoj. Ĉiu petu ĝin de la Eldonejo: "Nova Civito" Via della Scrofa, 14 Roma (Italujo). Tutjara kotizo: italaj liroj 1200, unu numero: italaj lir.210.

## S P R I T A Ĵ O J

**Kazoj de la vivo**

Mi edziĝis, kiam mi estis tridekjaraĝa, kun vidvino kvardekjaraĝa. Mia patro, prospera homo, kvindekjaraĝa, kiu ofte vizitadis min, enamiĝis je mia bofilino kaj edziĝis kun ŝi. Tiel mia patro fariĝis mia bofilo kaj mia bofilino fariĝis mia patrino, ĉar ŝi estis la edzino de mia patro. Post ne longe, mia edzino naskis filon, kiu estas bofrato de mia patro, kaj samtempe mia onklo, sed pro tio ke li estas frato de la edzino de mia patro, li estas ankaŭ nepo de mia patro, ĉar li estas filo de lia filo. Tio ne sufiĉas; la edzino de mia patro naskis belan infaneton, kiu tiel fariĝis mia frato kaj mia nevo, ĉar li estas filo de mia patro kaj filo de mia fratino. Mia edzino estas mia avino, ĉar ŝi estas patrino de mia patrino; mi estas edzo de mia edzino kaj ankaŭ ŝia nepo, ĉar mi estas file de ŝia filino, kaj pro tio ke la edzo de avino de iu ajn homo estas lia avo, tiel mi fariĝis avo de mi mem.

**Kia klavbato!**

Knabo havis la emon ellitiĝi malfrue je mateno. Vidu - diras al li la patro - antaŭ unu semajno, mia amiko, kiu ellitiĝis je la sepa matene, trovis sur tere monujon plenan de bankbiletoj . . . Jen la avantaĝo ellitiĝi frue!! Jes - diras la filo - sed tiu, kiu perdis la monujon estis tiel besto ellitiĝi antaŭ li.

(el "Gazzettino Dopolavoristico" di Milano, tradukis Quarone Giuseppe)

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

**RADIO ROMA - Esperanto Fako - Casella Postale 320 ROMA (Italujo) -**

La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.). Ondlongoj:met. 30,90; 41,24; 50,24.
DISSENDOJ EN ESPERANTO JARO 1962-a - Ĉiujn merkredoj: Kuriero de Esperanto.
FEBRUARO 1962-a - vendredon la 2-an/ Grandaj Sanktulej/ S-to Bonaventura - mardon la 6-an: Tra la literaturo - vendredon la 9-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 13-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 16-an: La poete de la itala Releviĝo: G. Carducci - mardon la 20-an: Italaj kanzonaj en Esperanto - vendredon la 23-an: Italaj belartaj urboj: Rimini -mardon la 28-an: Karnavalo en Italujo.

La Fakestro: L. Minnaja

**RADIO SOFIA: DISAŬDIGOJ EN ESPERANTO - SOFIO, BULGARIO**

Radio Sofia disaŭdigas en Esperanto ĉiudimanĉe de 19 ĝis 19,25 horo laŭ la horsistemo de Greenwich. Ondoj: metroj 39,11; 48,62. La disaŭdigo estas ripetata la saman vesperon de 22,55 ĝis 22,55 horo laŭ la horsistemo de Greenwich. Ondoj: metroj 30,93; 25,32.